

AL SCIENCULOJ DE LA MONDO!

Ni turnas nin al la membroj de Akademioj, al profesoroj de Universitatoj, al laborantoj en Sciencaj Institutoj — al niaj kolegoj tra la tuta mondo; ni turnas nin al ĉiuj, kiuj konceptas kaj sentas la universalecon de la scienco kaj kiuj sincere deziras, ke la sciencaj akiraĵoj vere apartenu al la Homaro.

Dum du grandaj internaciaj konferencoj — en Parizo en 1950 kaj en Munkeno en 1951 — ni detale esploris kaj objektivite trastudis la teknikan flankon kaj la spiritan-moralan aspekton de la lingva problemo en la nuntempa scienco.

Ni denove konstatis, ke manko de komuna scienca lingvo grave malhelpas la ĉiufankan, skriban kaj buŝan, senperan rilatadon de sciencistoj tra la mondo kaj ke tial multaj rezultoj de sciencaj esploroj — precipe de sciencistoj, apartenantaj al malgrandaj nacioj — restas tute nekonataj kaj, sekve, neatingeblaj de alilandaj scienculoj; ke, plue, fakte viglaj kaj larĝaj intelektaj interŝanĝoj forestas en internaciaj kadroj; ke, pro ĉio ĉi, ne povas kreiĝi kaj evolui sufiĉe forta sento de morala solidareco inter la diversnaciaj scienculoj.

Tiun bedaŭrindan staton rimarkis ĉiu scienculo en sia fako, sed ĝin akre sentis tute certe precipe tiuj, kiuj havas la okazon partopreni internaciajn kongresojn kaj konferencojn, prelegi en fremdaj landoj, studi en fremdaj medioj aŭ utiligi dokumentojn, skribitajn en fremdaj lingvoj.

Estis tempo, kiam verko de scienculo el kiu ajn lando estis legata de kolegoj en ĉiuj aliaj landoj, kiam ĉiu profesoro povis en la sama lingvo — la latina — prelegi antaŭ studentoj de kiu ajn universitato tiam ekzistanta.

Tiu tempo jam delonge forpasis kaj la scienco ĝis la hodiaŭa tago ne trovis alian konvenan solvon. Eĉ pli, kaj tio estas multe pli malbona, ĝi preskaŭ rezignacie akceptas la lingvan haoson kun ĉiuj ĝiaj malbonaj konsekvencoj. Montriĝis, ke la lernado de pluraj fremdaj lingvoj naciaj ne estas kaj ne povas esti konsiderata kiel solvo.

Restas, do, nur unu vojo: tiu de la Internacia Lingvo Esperanto — flua, logika, preciza instrumento de pensado kaj de komunikado.

Parte pro la aktiva kontraŭstaro de ĉiuj naciismaj diktatoraj reĝimoj, sed grandparte ankaŭ pro nekompreneblaj antaŭjuĝoj, la Internacia Lingvo restis ĝis nun en multaj sciencaj medioj ne nur neutiligata, sed kelkfoje eĉ plene ignorata. Kutime oni ne scias, ke tiu lingvo jam posedas literaturon de pluraj miloj da verkoj kaj studoj; ke ĝi havas sian propran poezion, sian gazetaron kaj siajn revuojn; ke ĝin praktike uzas centmiloj da personoj en ĉiuj nacioj.

Ni povis konstati, verkante mem en tiu lingvo, ĝian plenan taŭgecon tute aparte por sciencaj celoj. La scienca laboron en la Internacia Lingvo faciligas pli ol cent jam ekzistantaj teknikaj kaj fakaj terminaroj — afero, pri kiu povus fieri multaj naciaj lingvoj — interalie pri anatomio, arkitekturo, armeo, aviado, botaniko, ĥemio, elektriĝo, juro, matematiko, medicino, muziko; navigacio, farmacio, filozofio, fiziko, psikologio, radio, religio, statistiko, zoologio, scienco (ĝenerale), ktp.

Ni opinias, ke la Internacia Lingvo, pruvita praktika en sia pli ol 60-jara ekzistado, meritas seriozan konsideron fare de la scienco. Tial ni decidis entrepreni en la sekvantaj jarojn intensan laboron en du direktoj: unuflanke, disvastigi la Internacian Lingvon en sciencaj kaj ĝenerale en intelektulaj rondoj; aliflanke, utiligi ĝin por sciencaj celoj riĉigante la jam ekzistantan scienca literaturon en tiu lingvo. Tiu aktiveco precipe rilatos al diskonigo de la lingvo, starigo de novaj katedroj de Esperanto en universitatoj kaj samrangaj altlernejoj, publikigo de novaj sciencaj verkoj en Esperanto, eldonado de sciencaj revuoj.

Ni alvokas ĉiujn kolegojn kaj ĉiujn naciajn aŭ la internaciajn organizaĵojn por antaŭenigo de la scienco kaj por la internacia intelekta kooperado, atente prikonsideri la grandajn praktikajn kaj moralajn utilojn, kiujn prezentos la pli vasta uzado de la neŭtrala, simpla kaj facila Internacia Lingvo por sciencaj celoj. Ni ankaŭ petas ilin apogi ĉiumaniere, morale kaj materie, tiujn klopodojn, faratajn en la intereso de la scienco, kies universaleco urĝe postulas universalan, komunan esprimilon.

En Munkeno, la 7-an de aŭgusto 1951.

Por la II-a Sekcio

(Esperanto en Scienco kaj Tekniko)
de la 36-a.

Universala Kongreso de Esperanto.

La Prezidantaro:

D-ro Giorgio CANUTO, ordinara profesoro, rektoro de la universitato en Parma (Italio); D-ro Ivo LAPENNA, universitata profesoro, Zagreb-Parizo; Prof. Lucien LAURAT, Parizo; D-ro Edmond PRIVAT, ordinara profesoro en la universitato de Neuchâtel (Svislando); D-ro Hugo SIRK, profesoro en la universitato de Vieno (Aŭstrio); Prof. Gaston WARINGHIEN, Parizo.

Atentigo: Tiu ĉi alvoko estas malfermita por subskribo fare de aliaj kolegoj ĝis la 1.1.1952.

41 : 656.7

271 : 41 : 72
656.7 : 654.16 = 089.42

INTERNACIA LINGVO SERĈATA POR AVIADO.

Dum la lasta tempo ICAO (Internacia Civila Aviada Organizaĵo) multe diskutis la problemojn de lingvo en la aertrafiko, precipe konsiderante la problemojn kiuj evidentiĝis en la uzo de la angla lingvo kiel la oficiala internacia lingvo por la aviado.

En konferenco de la Komunikada Sekcio de ICAO, en Montreal, Kanado, 24 Aprilo — 2 Junio 1951, oni rekomendis al ĉiu ŝtato reprezentata en ICAO, ke oni starigu esploradon pri la redaktado de aviada internacia lingvo surbaze de la angla. Laŭ tiu rekomendo oni celas aliformigon de la angla lingvo kun laŭebla enmikso de latindevenaj vortoj kaj elbaro de anglaj vortoj kiuj estas malfacile prononceblaj por ne-angloj. Unuavide tio ŝajnas esti vana klopodo

naski hibridan lingvon, sed oni jam spertis kiom da fantazio povas okazi sur la lingva kampo malgraŭ la fakto ke jam ekzistas multjare provita solvo en Esperanto.

Aparte grava por ni estas la jena diro en ĝia raporto (DOC. 7171-COM/544):

..... La Sekcio konsideris, ke la kreo de tute artefarita lingvo estas projekto tro akademia kaj verŝajne ne atingus bonajn rezultojn aŭ la necesan kunlaboron en plenumiĝo kiu estas esenca por la sukceso de tia klopodo." (p. 288)

El tio estas tute evidente, ke la Sekcio aŭ ignoris aŭ ne konscias pri la atingoj de Esperanto. Estas tre dezirinde, ke ĉiu Esperantisto skribu al la Sekretario de Sekcio ILA, ICAO, Montreal, atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.

C. C. GOLDSMITH, Ĝenerala Sekretario de UEA.

614.25(52)

614.25(52) : 408.92 + 61(05) = 089.2

JAPANAJ MEDICINISTOJ ESPERANTISTAJ AKTIVAS.

En Japanujo de la 1-a ĝis la 5-a de Aprilo, 1951 okazis en Tokio la 13-a Tutjapana Medicina Kongreso, unua evento post la milito, ĉe kiu ĉ. 18 000 kuracistoj aŭ medicinistoj el tuta Japanujo partoprenis. Lia Majesto Tenno, usonaj altranguloj, multaj eminentuloj kaj aliaj honore ĉeestis ĝin. La unua ankaŭ solene salutis la tutan ĉeestantaron.

Kaptante ĉi tiun ŝancon, japanaj Esperantistaj medicinistoj ankaŭ okazigis la postmilitan renovigitan kunvenon de Japana Esperantista Medicina Asocio (JEMA). Tie partoprenis 29 medicinistaj kaj 4 nemedicinistaj samideanoj. Ĉe la malfermo D-ro H. Shinoda el Yamagata unue salutis la tutan ĉeestantaron, kaj Prof. Yagi el Okayama Universitato estis elektata kiel la prezidanto, kaj li ankaŭ salutis, Prof. Suzuki el Tiba Universitato informis pri la baldaŭ en Tokio eldonota esperantlingva „*Medicina Revuo*”, kiu post ne longe aperos sub lia ĉefredaktoreco. Prof. Ura el Okayama Universitato klarigis pri „*Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio*” (TEKA), kiu estis unue fondata en 1908 laŭ la alvoko de D-ro W. Robin de Warszawa, dum la 4-a Universala Kongreso en Dresden. D-ro H. Shinoda ankaŭ klarigis pri „*Internacia Medicina Revuo*” (IMR), kiu estis depost 1925 kiel oficiala organo de TEKA redaktata ĉefe de D-ro M. Briquet de Lille; kaj li antaŭ ĉio kore bedaŭris, ke TEKA, kies nuntempa provizora Prezidanto estas Prof. G. Canuto de Parma, nun ankoraŭ inerte dormadas depost la milito, kaj ĝia oficiala gazeto IMR ĉesigis sian aperadon post la lasta apero en 1937. D-ro H. Shinoda ankaŭ prezentis la teknikan vortaron „*Medicina Vortaro*” de D-ro M. Briquet, ĝin montrante al ĉiuj ĉeestantoj; kaj li plue montris la lastatempan italan medicinan revuon „*Giornale di Clinica Medica*”, kiu estas nuntempe eldonata, unika medicina revuo kun Esperanta resumo.

Plue gaja sinprezentado kaj vigla diskutado okazis pri kiel oni devas aktivigi la renovigitan JEMA. Oni memore fotografis kaj disiĝis promesante revidon post 4 jaroj.

Samideanaj kuracistoj en ĉiuj landoj! Estu kuraĝigitaj per la laŭdinda agado de japanaj kuracistoj samideanaj kaj klopodu por la revigligo de inerta TEKA. Kuracistoj, kiuj volas ageme alvoki al JEMA aŭ TEKA, rekte informu al D-ro H. Shinoda. Lia adreso estas: D-ro Hideo Shinoda, Kasumicho, Yamagata-shi, Japanio.

061.22 ISAE

ISAE-INFOJMOJ.

61. **Scienca Revuo.** La eldonisto informis, ke li ne plu povas akcepti abonajn el landoj, el kiuj oni ne sukcesis sendi pagon, nome: Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo, Hungarujo, Japanujo. Ni plu sendos la revuon al tiuj membroj, kiuj sukcesis en ia maniero tamen sendi pagon, ekz. per turista interŝanĝo aŭ per donacoj el aliaj landoj aŭ per libroj. Aliaj bonvolu kontentiĝi per membreco kiel aprobantoj, kiuj ne ricevas la revuon kaj kiuj pagas nur 2 anglajn ŝilingojn aŭ egalvaloron (al la delegito).

62. **Unio de internaciaj asocioj (UIA)** sendas al ni regule sian monatan bultenon, kiu i.a. enhavas liston de venontaj internaciaj konferencoj. UIA proponis al ni membrecon kiel „korespondanta organizo”. Kredeble ni akceptos la inviton, ĉar ni povas uzi la servojn de tiu unio, eble ankaŭ por peri kotizojn.

63. **La jarkunveno de ISAE** okazis la 6-an de aŭgusto en la universitato en München sub prezido de dipl. inĝ. C. Dellian, germana delegito de ISAE. Raporto venos.

64. **Svisa delegito de ISAE:** D-ro Oskar Huber, UETENDORF (Bern). La jarkotizo kun revuo estas 6 svisaj frankoj.

65. **La komitato por Scienca Revuo** laŭ punkto 10 de la statuto konsistas el la redaktoro, unu reprezentanto por la estraro de ISAE, kaj unu reprezentanto por la eldonisto. Tiuj personoj estas: s-roj W. P. Roelofs, G. F. Makkink, J. Muusses, ĉiuj en Nederlando.

66. **Inĝeniero Karl Wästfelt**, Svedujo, membro kaj revizoro de ISAE, mortis la 22.8.1951.

67. **Terminologia fako.** S-roj E. D. Durrant, I. Lapenna, C. Naoumoff fondis angla-francan elektroteknikan vortaran komitaton kun fakuloj el BESA kaj la franca sekcio de ISAE. Gvidanto estas s-ro Naoumoff.

Sven Alexandersson